

Beletra Konkurso Ramon Fernàndez Jurado

Castelldefels, la 7-an de junio 2014

Esperanta poezio

Unua premio

Ferriol Macip: *Vere granda kataluno*

Dua premio

Jordi Puig: *Kriptaĵo kun soneto*

Esperanta prozo

Unua premio

Dolors Godoy: *En kiu momento vi elmergiĝis, Castelldefels?*

Dua premio

Jesús González: *Ĉiam restos al ni... Castelldefels*

Kataluna aŭ hispana prozo

Unua premio

Paquita García: *L'esperanto, el gran desconegut*

Poezio: unua premio (Esperanto)

Ferriol Macip

Vere granda kataluno

Vere granda kataluno,
venis el Andaluzio
kaj per sia poezio
li, de l' kapitalo puno
dum estis de l'estint' nuno
kaj de l' esper' ĉefa plado,
per tre intensa akitvado
batalis por justa mondo.
Estu eterna en ĉies rondo
Ramon Fernàndez Jurado.

Jaroj pasis, sed ne ĉio
dezirinde evoluis,
la revon de Ramon fruis
idoj de l' demokratio,
sed, ve, popola partio
per nostalgia regado
kaj memora forigado
forviŝis per granda streko.
Nomiĝu l' biblioteko
Ramon Fernàndez Jurado.

Poezio: dua premio (Esperanto)

Jordi Puig

Kriptaĵo kun soneto

Jen sub inflama diro de intrigo
La ĉenon vi disrompis per komiko,
Kaj la venusa suko de petol'
Elŝtelis mian memon per kabalo.

Kaj trobadore, kiel farandol',
La saŭcan nukson dikan de amiko
Mi rimis, kvazaŭ flamon de l' tropiko,
Kaj vi, en mikrokosma hiperbol',

Elŝtelis mian memon per kabalo.
Sibile vibris mi, kaj en petalo
Forgesis vian kapon mia fat'

Kaj fantazie nunis vi en kredo,
Dum rozis mia letargia peto
Kaj revis, preskaŭ splenis pro nugat'.

KRIPTAĴO KUN π -SONETO

Al Ramon Fernández Jurado, tutkore

Al Ramon Fernández Jurado, tutkore



36160	68536	99934	73241
48444	25270	60429	92982
60499	69919	63250	66945
68450	89584	07388	61313

Prozo: unua premio (Esperanto)

M. Dolors Godoy Rotllens

En kiu momento vi elmergiĝis, Castelldefels?

Mi veturis al Barcelono por renkonti miajn geamikojn de Castelldefels kiuj posedas apartamenton en kvartalo La Pineda.

De unu kafejo ni rigardis kiel la unua printempa varmigo allogis jam multe da banantojn al la plaĝo, sed ankoraŭ ne ĉiuj estis pretaj por enakviĝi en la malvarma maro.

Miaj geamikoj invitis min viziti sian urbon kaj ĝian longan plaĝon, peco de la metropolaj plaĝoj preskaŭ 140 metroj larĝa kaj 42 kilometroj longa ekde Montgat. Oni kalkulas, ke pasintjare vizitis tiun plaĝon pli ol unu miliono da homoj.

Mi akceptis tre kontente ilian inviton ĉar mi multe ŝatas scii pri novaj lokoj sed, mi devas klarigi, ke pli ol viziti urbon kaj promeni tra ĝiaj stratoj, mia intereso estas ĝia historio ĉar ni estas idoj de tiu historio kaj de tiuj homoj kiuj unuafoje lasis tie iliajn spurojn.

Akceptinte la inviton kaj jam gastigita en Castelldefels, la Castrum Felix – nomo de la antikva kastelo kiu donis la nomon al la urbo- ankaŭ konata kiel Castello de Feels –kastelo de fideluloj- mi pensis, ke mia unua farenda tasko estu viziti la bibliotekon por informiĝi.

Kiam mi alvenis tie, en la strato Episkopo Urquinaona, mi unue demandis pri la nomo de la Biblioteko “Ramón Fernández Jurado” kaj mi sciis pri la personeco de tiu batalanta laboristo, defendanto de la homara libereco, laboristo, socialisma, andaluza, aliĝito al “Assamblea Nacional de Catalunya”, magistratano de la urbo, deputito kaj ESPERANTISTO kiel mi! Kaj pri la malplezuro de la magistrato ĉar la nova urbestro deziras ŝanĝi la nomon de la biblioteko.

Tion sciinte mi iris ĉe la plaĝo post transiri la grandan aŭtovojon, kaj antaŭ trovi la sablon mi serĉis trankvilan kvietan lokon por miri la vastan belecon de la Mare Nostrum. Mi rigadis en la malproksima horizonto kaj, preskaŭ endormiĝinte, mi kredis ekvidi la imponajn romiajn galerojn, alvenitaj de la granda Romia Imperio ĝis la Hispania marbordo eble por plenigi ties amforojn per la bona vino farita per la ĉi-urbaj vinberoj. Aŭ irante al Barcino, al Tarraco...

Kiel devis esti tiu marbordo tiutempe? Kiuj spuroj daŭre estos sekretigitaj en ties profundo, en la profundo de tiu sablo plurfoje ŝanĝiĝinta, balaita de la maro, plugita de la maŝinoj...

En Castelldefels ne estas tro antikvaj restaĵoj. Sed pratempaj homoj sendube tretis ĝian grundon el la bronza aĝo, romianoj, visigotoj, araboj, mezepokaj gentilhomoj... La unuaj dokumentoj kiujn oni havas estas de la jaro 966 kaj per

tiuj dokumentoj oni scias ke loĝis en la urbo estis sufiĉe multaj homoj kaj jam aperis la nomo de la preĝejo Santa Maria.

Mi sentis subite ke min kaptis la historio kaj decidis, malgraŭ la varma vetero, reiri en la urbon, dum la imponaj romiaj galeroj alproksimiĝis al la marbordo. Mi tretu la sablon kiam mi pli bone scios pri la restaĵoj trovitaj subgrunde.

Mi reiru al la biblioteko por pli bone scii la historion de tiu urbo, mi promenu tra ĝiaj stratoj, mi vizitu la preĝejon de Santa Maria apud kiu daŭre estas la restaĵoj de la antikva fuorto kiu donis la nomon al la urbo kaj rolas kiul ĝia simbolo.

Kiam ni tretas novan lokon, ĉu ni foje haltas por ekpensi sur kiom da miloj da jaroj de la historio ni tretas?

Prozo: dua premio (Esperanto)

Jesús González Jurado

Ĉiam restos al ni... Castelldefels

Bedaŭrinde mi havas malmultajn rememorojn pri mia infanaĝo. Nenio pri Andaluzio, kie mi naskiĝis. Nenio pri la alveno al Sant Boi. Tamen mi ja rememoras la marbordon de Castelldefels somere dum la unuaj jaroj de la 70-a jardeko de la pasinta jarcento. Longa, larĝa, (kelkfoje) malpura. Multaj homoj sur la sablo, infanoj, plenaĝuloj, maljunuloj,... Tie mi lernis naĝi: la "hundeto", la plej facila naĝmaniero tamen sufiĉa por forgesi la savzonon kaj sentime enmeti min en la maron, englutante multan akvon kompreneble!. Instruis min mia patro, kiu apenaŭ havis pli konon pri la temo ol mi. Estis unu el la malmutaj aferoj, kiu ni faris kune. Kaj poste mi rememoras miajn malgrandajn gefratojn, kuŝantaj sur la sablo rigardante min, dum mi provis konstrui ion simila al kastelo, kion mi neniam atingis. Kaj la malvarma omleto kun koka-kolao, la tiama kutima manĝaĵo. Kiel ni veturis ĝis tie? Per trajno de Gavá. Tiu trajno malpura, malrapida, superŝarĝita per familioj, sunombreloj, portebraj fridujoj, bruegaj kasediloj, ktp, kiu iris ĝis la haltejo de Castelldefels, kie amasoj da avidaj dimanĉuloj alsaltis al la apuda sablo, serĉante la plej bonan lokon. Poste, miaj gepatroj aĉetis "Seat 127"-on kaj nia socia pozicio ege pliboniĝis. Ni jam estis memsufiĉaj!.

Kun la grupo de amikoj, ni daŭre aliris al Castelldefels. Buso kaj trajno per kiu ni veturis ĉiam senpage kaj la kontrolisto neniam kaptis nin!. Mi ankoraŭ ne komprenas, kiel ni povis rezisti la tutan tagon sur la sablo sen sunombrelo. La forto kaj senkonscio de la junaĝo, mi ne havas alian klarigon. Kiom da rememoroj!: tiu matĉo de futbalo sur la sablo, ĉirkaŭ 20 uloj kontraŭ aliaj 20, kaj mi atingis 2 golojn! (granda heroaĵo ĉar mi neniam estis bona futballudanto); aŭ kiam 8 aŭ 10 amikoj estis manĝintaj sandviĉojn, duonvestitaj, sidantaj sur ŝtuparo de konstruaĵo kaj subite, antaŭ ni, haltis urbpolice aŭto kaj la policisto demandis nin: ĉu ŝajnas al vi, ke ĉi tio estas estetika? Ni ne respondis lin, simple, leviĝis kaj serĉis alian lokon pli kvietan. Aŭ kiam ni "koketis" kun tiuj knabinoj... Fakte, la vera vero estas, ke ili diris al ni (ĉu ni estis 3 aŭ 4?) kelkajn spritaĵojn kaj tio ege timiĝis nin kaj ni ne kuraĝis interbabili (tiuepoke ni estis tre hontemaj!). Kiam ili eliris, diris al ni: ke dio donu al vi bonajn virinojn kaj multaj filoj! (diable, tio doloris nin). Aŭ kiam ni revenis de Castelldefels, post tuta sunumita tago, veturante per la malnova Seat 850 de Montse kaj la bremsoj ĉesis funkcii. Ni sukcesis alveni hejmen danke al la servobremso. Kompreneble ni veturis malrapide, tre malrapide, dum la aliaj stirantoj sonorigis siajn sonoravtilojn kaj ĵetadis al ni kelkajn malmulte agrablajn esprimaĵojn.

Poste, ni jam komencis labori kaj gajni monon kaj nokti kaj trinki... kaj drinki. Kaj kiam en Sant Boi fermiĝis la lasta trinkejo, la plej bonŝanculoj (kiuj havis aŭton aŭ amikon posedantan aŭton) aliris al Castelldefels, por fini la nokton tie, en kiu ajn trinkejaĉo. Ni multe veturis per la malnova Renault 5 de Olie, kiu ĉiam petis al ni cent pesetojn por benzino! Kaj ni ja donis ilin, fakte, li ŝoforis por ni kaj poste alportis nin hejmen. Ĉi tio jam estas alia historio, ni jam ne estis knaboj. La stirantoj trinkis tiom, kiom la vojaĝantoj. Kaj tiu ŝoseo inter Gavá kaj Castelldefels, longa, malluma, tre malluma. Kaj danĝera. Tute rekta, kie estis facile antaŭeniri aŭton sed ankaŭ facile kolizii. Kiel tiu okazo, kiam Tere antaŭeniris nin ĝuste kiam venis alia aŭto kontraŭ ni. Kompreneble ni admonegis ŝin poste en la trinkejo, kaj ŝi ekploris. Pli ol 20 jarojn poste, ni ankoraŭ rememoras tion kaj ridegas. Aŭ kiam Juan, (la longharulo) veturis en mia aŭto kaj rompis (senvole) la internan spegulon. Kompatinda Longharulo, bona kamarado, tamen kun alkoholaj kaj psikologiaj problemoj. Aŭ kiam ni ŝtelis vinon en Casa Pepe. Kiom da boteloj? Eble 20 aŭ 30. Kaj poste ni disdonis ilin inter la gekamaradoj. Kaj la noktoj de Sankta Johano, iom malvarmaj, sed bonsanĉe la alkoholo ĉiam helpis nin; kaj la fajroj sur la sablo kaj la noktaj banoj en la maro kaj la postaj tagiĝoj. La bezinstacio ĉe la aŭtovojo de Castelldefels tutnokte malfermita, kie ni ĉiam aĉetis bieron. Kaj la koncertoj de punka aŭ metalroka muziko ĉe la kastelo. Kaj... ankaŭ kelkfoje drogoj (haŝiŝo, mariĥuano), kelkfoje kvereloj (kun aŭ sen frapoj)...

Kaj poste, iom post iom ĉio ŝanĝiĝis, la amikaro disiĝis, unuj geedziĝis, aliaj ne. Unuj havis filojn, aliaj ne. Iuj mortis, Longharulo, ekzemple. Kaj lia frato, surveturita en la aŭtovojo de Castelldefels, dum nokto de ebrieco. Aliaj memmortigis sin, kiel Agustín. Eble iuj nun estas tre feliĉaj kaj aliaj eble ne. La tempo pasadas kaj mi perdis la kontakton kun preskaŭ ĉiuj.

Sed, kiel oni diris en tiu filmo: "Ĉiam restos al ni... Castelldefels".

Prozo: unua premio (kataluna/hispana)

Paquita García

L'esperanto, el gran desconegut

Vaig sentir per primera vegada la paraula “esperanto” acabats d’acomplir 14 anys. A casa teníem un amic molt estimat, que era un apassionat d’aquesta llengua. Volia, tant si com no, que jo l’aprengués i em va proporcionar una gramàtica, però jo en tenia prou i massa amb el batxillerat i el que m’interessava d’aquell amic era la seva fascinant manera de contestar tantes i tantes preguntes com jo em feia. La nostra amistat va durar 33 anys. Es deia Josep Gómez Ibars i era un pou de ciència i bondat. .L’any 1998 va morir aquell gran amic. I uns dies abans de la seva mort em va dir: “no deixeu morir l’esperanto”. En aquells moments només vaig pensar que l’esperanto era un antic i bonic sonni estroncat, fora dels objectius de la nostra època.

A mitjans del proppassat 2013, una amiga em va explicar que el seu pare havia estat un gran esperantista i que a ella, encara que fins llavors no ho havia pogut portar a terme, sempre li hauria agradat aprendre la llengua que va captivar el seu pare.

Va contactar amb la Kataluna Esperanto-Asocio i totes dues vam començar a estudiar la dolça llengua inventada pel doctor Zamenhoff feta per parlar d’amor, pau i solidaritat.

El tracte senzill, franc, amical, sense embuts ni subterfugis d’aquells que he anat coneixent en aquests anys m’ha obert un món desconegut. El valor que aquests companys donen a la cultura, el conreu que molts fan de la poesia... M’han fet comprendre que m’hi assemblo, que són les persones amb qui més de gust m’he trobat al llarg de la meva vida.

I encara hi ha una altra cosa: una vivència onírica, una fantasia, un miratge potser? Una tarda em vaig deixar caure a la sorra d’una platja quan ja se n’anaven els turistes. Capvesprejava.

Jo havia anat a veure uns coneguts a Castelldefels i em vaig trobar a prop de la platja. El suau murmuri de les onades em cridà amb una força gairebé irresistible. Encara vaig sentir les darreres passes d’aquells que marxaven. Finalment m’hi vaig trobar totalment sola. Em vaig estirar. Em vaig sentir còmoda, unida a la sorra, a les onades, tranquil·la. Vaig imaginar com m’agradaria expressar tot un munt de sensacions en esperanto: la llengua inventada per agermanar, per dir coses boniques. De sobte vaig notar una presència al meu costat:

--No vulguis córrer tant! Ja en faràs, de versos en esperanto. Tot just estàs començant.

Sorprenentment, no em vaig espantar. Em vaig sentir protegida, càlidament acompanyada. No tenia ganes de parlar, sinó d'escoltar aquella veu d'home que no sabia ben bé d'on m'arribava:

--Sovint passejo per aquest lloc. Jo hi vaig viure anys aquí, a Castelldefels.

vaig ser-ne professor d'esperanto i vaig freqüentar molt la seva biblioteca. Tota la vida vaig lluitar per la llibertat i per això em van empresonar. Però a la presó m'aconsolava fent versos i sabent que la meva causa era bona. Em dic Ramon Fernández Jurado i aquesta nit he sentit l'impuls d'acostar-me a una persona que sento que sempre ha desitjat ajudar els altres i relacionar-se amb gent que veïés la vida com un miracle i que ho estimés tot.

--I com ho saps, tot això, de mi?

--Perquè quan traspassem, podem llegir els pensaments de les persones. Jo sóc molt a prop dels meus companys esperantistes i d'aquells que teniu nobles ideals. I tu m'has cridat aquesta nit. Per això he vingut. Però no puc trigar gaire a marxar. S'està fent de nit. Està a punt de passar l'últim tren i no et pots quedar més aquí. Adéu.

I un altre cop em vaig sentir totalment sola. No em sabia avenir que m'hagués passat una cosa tan colpidora. Sé que ningú em creurà si li ho explico, però no oblidaré mai aquesta experiència. Ràpidament, per no perdre l'últim tren, em vaig posar dreta i vaig marxar. Només vaig tenir el temps just de treure el bitllet, que el tren ja arribava.

Però la meva xerrada amb aquell misteriós personatge sorgit del més enllà va ser el senyal més convincent que la família esperantista seria la meva per sempre més.